# Novjorka Prismo

Numero 97 Oktobro 2000


*The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language at its annual OPEN HOUSE!*

DATE: Friday, October 20, 2000, 6:30-9:00 pm

PLACE: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAM: 6:30 – Refreshments

7:00 – New York esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, songs in Esperanto, and a videotape about the International Language. Everyone is welcome! ★

## Protokolo de la kunveno de la 15-a de septembro 2000

Je 7:07 ptm, Tomaso Eccardt oficiale malfermis la kunvenon. Li rimarkis, ke la septembra kunveno estas la sola de la somero.

Ni ne havis gastojn. Granda sumo de 17 personoj ĉeestis la kunvenon. Nur ok personoj ĉeestis je la komenco de la kunveno, ĉar la ĉambreto estis en nefacile trovebla parto de la kutima etaĝo. Post dudek minutoj, grupo de sep aliaj personoj alvenis al la ĝusta ĉambro.

La septembra *Novjorka Prismo* ne enhavis protokolon, do ne estis bezono por akceptado. Rochelle F. Grossman menciis, ke mankis al ŝia raporto sur paĝo 4 sub la titolo "UEA/Novjorko" la fakto, ke la ceremonio okazis en la ekstera publika placo de UN.

Tomaso faris anoncojn pri la oktobra evento en Okemo, pri la klasoj ĉe Stuyvesant Adult Center, kaj pri la Malfermita Domo. Li menciis, ke personoj povos prelegi dek minutojn pri unu temo dum la Malfermita Domo.

Rochelle anoncis, ke ŝi ricevis poŝtkartojn el Londono de Laura Miller, kaj el Israelo de Pam Lieber. Rochelle ankaŭ ricevis noton de Rosa Helfgott, kiun Rosa skribis tiam, kiam ŝi vizitis la UEA oficejon kaj Rochelle bedaŭrinde ne estis tie. Rochelle ankaŭ anoncis, ke ekzistas ELNA fonduso de Klara Zamenhof. Tiu fonduso pagos kotizojn de neriĉaj, novaj esperantistoj por allogi ilin al Esperanto kaj al ELNA. Rochelle vendis Esperanto-plumojn kontraŭ dudek kvin cendoj, Esperanto-poŝtkartojn kontraŭ unu dolaro, kaj Esperanto-sakojn kontraŭ kvin dolaroj. Rochelle disdonis malnovajn kopiojn de la UEA Jarlibro.

Tomaso ripetis kelkajn anoncojn por la personoj, kiuj jus alvenis al la nefacile trovebla kunvenĉambreto.

Arnoldo Victor menciis, ke li luos aŭtomobilon por iri al Okemo, kaj ke la kunveno estos je la pinto de la foliŝanĝa sezono.

Leonardo Dzelzitis, Alex Karkovsky, kaj Rochelle F. Grossman anoncis siajn proponojn por prelegoj, kiujn ili faros dum la Malfermita Domo.

Tomaso anoncis, ke estrara kunsido okazos je la 11:30-a horo, la 1-an de oktobro; ne je la 11-a horo, kiel menciite en *Prismo*.

Tomaso urĝis membrojn trovi kaj alporti al la Malfermita Domo personojn, kiuj ne estas esperantistoj. Oni ankaŭ diskutis pri kostoj por enmeti en ĵurnalojn, kiel *Village Voice*, reklamojn de diversaj grandecoj pri Esperanto kaj pri la Malfermita Domo.

Tomaso anoncis, ke li starigos tablon pri Esperanto apud la Librofoiro je la 47-a strato kaj la 5-a avenuo, la 24-an de septembro de la 11-a horo atm ĝis la 5-a ptm. Li serĉis volontulojn helpi lin.

Nijl Blonstein anoncis, ke li havas tri libretojn de fotografoj pri kunvenoj, kiuj okazis dum la somero.

Susan Kohn, ano de la ĉijara kandidatiga komitato, anoncis, ke estas bezonataj du personoj, unu por nova vicprezidant(in)o, kaj unu por nova programdirektor(in)o.

Rochelle, Alex, kaj Nijl parolis pri siaj spertoj ĉe la Universala Kongreso en Israelo dum la somero. Ili parolis pri la vetero, pri lokoj en kaj ekster Israelo, kaj pri kiel multekoste (Alex) kaj kiel malmultekoste (Nijl) povas esti ĉeesti kongreson. Ili menciis, ke ne estas nun granda nombro de esperantistoj tra la araba mondo.


Nancee Medrano alvenis al la kunveno kun sia filino, Emily. Tio plialtigis la nombron de ĉeestantoj al 17.

Tomaso faris surprizan prelegon pri la fakto, ke kelkaj Esperanto-vortoj sekvas la regulojn pli ol oni pensas, kaj ke aliaj vortoj konformas malpli ol oni pensas. Kiel ekzempoj, li uzis vortojn, kiel multekosta, pruntedoni, nelegipovo, nun, ĉi-tiam, kaj piedfingroj; kaj nevortaj, kiel malnokte kaj malknabo. Li montris, ke vortoj, kiel pura kaj formo, povas havi pli ol unu sencon.

Je 8:57 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Poste, kelkaj personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Librofoiro



La 24-an de septembro Nijl Blonstein, John Liechty, Rochelle F. Grossman, kaj mi postenis tablon ĉe la librofoiro "New York is Book Country." Pli malpli 50 preterpasantoj ricevis informojn pri Esperanto, kaj espereble ili prenos la kurson aŭ vizitos la Malfermitan Domon. ★

*– Tom ECCARDT*

## Sony Plaza

La 1-an de oktobro multe da esperantistoj kunvenis neformale ĉe Sony Plaza kaj diskutis pri la venontaj usona elektado kaj jara renkontiĝo en Okemo. ★

*– Tom ECCARDT*

## UEA/Novjorko

La 5-an de oktobro mi ĉeestis tuttagan konferencon ĉe UN honore al la deka datreveno de la International Day of Older Persons: Towards a Society for All Ages. Matene prelegis ambasadoro Julia T. de Alvarez (Dominikana Respubliko) pri la unua World Assembly on Ageing (Vieno, 1982) kaj prelegis Arthur C.I. Mbanefo (Niĝerio) kaj ambasadoro Inocencio F. Arias (Hispanio) pri la dua Assembly on Ageing (Madrido, 2002). Estis tre interese aŭdi la vidpunktojn de du junuloj de altlernejo en Ewing, NJ, kaj de juna studentino pri gerontologio ĉe Hofstra University. Posttagmeze oni montris parton de la filmo *Buena Vista Social Club* pri grupo de muzikistoj ĝis la aĝo de 90, kiuj post longa periodo de neludado denove prezentis koncertojn, ne nur en sia propra nacio, Kubo, sed ankaŭ ĉe Carnegie Hall. Sekvis paneldiskuto pri multgeneraciaj/multkulturaj perspektivoj pri la vivo dum la maljunaj jaroj. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## Laste vizitis UEA/NY

La 6-an de oktobro vizitis Amanda HIGLEY (Carmichael, CA) survoje al Okemo. Amanda revenis al Usono post 15 monatoj en Eŭropo (vidu ŝian leteron en *Esperanto usa* (4/2000, paĝon 1). Ŝi nun intencas vojaĝi tra Nordameriko por propagandi pri Esperanto inter gejunuloj. Ĉeestis la renkontiĝon ankaŭ Sonia SOSKINA, kasisto de nia Societo kaj konsilanto de Unicef, proksime al la UEA oficejo. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## Okemo 2000

Ni estis ses survoje al Okemo, inkluzive la pri-vojaĝado-prelegonton Amanda Higley. Ankaŭ Tom Eccardt kaj mi prelegis, Tom pri gramatikaĵoj kaj mi pri Unikodo. Ni havis luksan ĉambraron proksiman al la naĝejo, kaj kunloĝis Dave, la filo neesperantista de Mary Murphy el Florido. Dave fidele vizitis la lingvo-lecionojn por komencantoj. Ni kunmanĝis matene ĉe ni, kaj tagmeze kaj vespere kun aliaj esperantistoj.

Proksimume kvardek partoprenis, inter ili pli ol dek junuloj kaj konsiderinde multaj novuloj, do, tio estis kuraĝigilo por daŭrigo de la festa semajnfino. ESNY-ano Enrique Ellemberg prelegis pri sia interreta hejmpaĝo, kaj li disdonis moldiskojn al la aŭskultantaro. Mi poste sukcesis montri, ke la enhavo de la disko estas utiligebla ankaŭ por Makintoŝa komputilo, kvankam desegnita sole por PC. Ankaŭ partoprenis kelkaj personoj jam amike konataj al ESNY-anoj – kiaj Bill Maxey, gesinjoroj Boschen, Tom kaj Dana Alexander kun la ideto, kaj Normando Fleury kaj Zdravka Metz kaj ilia filino Mira.



*Normando Fleury ĉe Okemo 2000.*

Multaj promenis en la belega naturo, pli verda ol normale je tiu dato. Ni ĝuis klaran ĉielon ambaŭ noktojn, kaj tio faciligis rigardon de steloj, stelaroj, kaj galaksioj nevideblaj en la urbego. Tage variis la veterkondiĉoj, kaj dum unu duonhoro eĉ neĝetis.

Post la fina komuna festmanĝado kantigis nin Niĵl Blonstein per du novaj kantoj, sin akompananta per gitaro. Tiu kultura vespero estis aparte sukcesa kun pli da regalintoj ol iam ajn.

Amanda daŭrigis sian vojaĝadon al Montrealo, kaj ni kvin reveturis hejmen, haltantaj dufoje en Vermonto – en Chester por ke Tom aĉetu sukeraĵan memorigilon, kaj en Brattleboro por kontroli la kooperativan manĝajvendejon. ★

– *Arnold VICTOR*

## Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

### Oktobro

**16**

Free Beginners' Esperanto Class begins at Stuyvesant Adult Center
*Mondays, 6:30-8:00 pm for 7 weeks*

**20**

**ESNY Open House**
*Friday, 6:30 pm at UFT*

### Novembro

**5**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 98)

**17**

**ESNY Kunveno**
*Friday, 6:30 pm at UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

**Stuyvesant Adult Education Center**
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411



*Partoprenantoj de Okemo 2000 ĉe la piedo de la monto.*




**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Arnold Victor (212) 645-3794
**Kasistino** Sofiya Soskina (718) 671-5699
**Program-Direktoro** Alex Karkovsky (718) 769-7255



**Novjorka Prismo**
Numero 97 – Oktobro 2000
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo
**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley
Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com



© 2000 Esperanto Society of New York